


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

La morto de maljuna ĉamo (traduko).



Sepjara estis la ĉamo! De sep jaroj ĝi kuris de roko al roko, de paŝtejo al paŝtejo. Dum sep vintroj ĝi dormis sub la branĉoj de abioj, kovritaj de neĝo.

Kiel bela vivo, de printempo al aŭtuno, se ne ekzistus la ĉasistoj!

Iun aŭtunon la ĉasistoj pafis al ĝi kaj trafis ĝin en la dekstran ŝultron, sed, bonŝanca, ĝi resaniĝis.

Tiun ĉi jaron kvar fervoraj kaj obstinaj ĉasistoj de Passy forlasis la vilaĝon per aŭtomobilo en la mezo de la nokto. Ili atingis Plaine-Joux. Ili tie lasis la veturilon kaj embuskis kontraŭ ĝi en la rokoj.

Matene, ĉirkaŭ la 8-ahoro, la maljuna ĉamo ĝuis la karesojn de la suno. „Kiel bela tagokomenciĝas!” ĝi verŝajne pensis.

Subite ĝi aŭskultis, maltrankvila, kaj ekstaris

Ek-pafo! Timege ĝi saltis rekte antaŭen kaj subite troviĝis kvardek metrojn de ĉasisto. Ĝi provis ŝanĝi sian direkton, sed tro malfrue! Nova ekpafo kaj la kompatinda ĉamo, mortvundita, falis en kavon.

Kaj Gabriel, la ĉasisto, laŭte kaj ĝoje kantis, kaj vokis sian kamaradon. Ili portis la ankoraŭ varman korpon de la besto sur siaj ŝultroj kaj reiris al Plaine-Joux, kie ili trovis la du aliajn ĉasistojn kaj la aŭtomobilon. Ili metis la mortintan beston sur la motorkovrilon de la aŭto, kaj fiksitis ĝin per ŝnuroj tiel, ke oni povus kredi, ke la besto staras tie vivanta. Kaj la ĉasistoj, kantante, revenis al la vilaĝo. Sur la fusilo de Gabriel estis floroj.

Kiam ili alvenis, ni, lernantoj, estis en la korto por paŭzi kaj ni ĉeestis la spektaklon.

Verkis G. Mollard (11-j.) laŭ la Freinettekniko.

Ĉ

(Por la infanoj: sed eble ankaŭ por la granduloj).

- Ĉ estas la ĉeno, kiun ni frakasu.
- Ĉ estas la ĉagreno, kiu forpasu.
- Ĉ estas la ĉamo sur altaj la montoj.
- Ĉ estas ĉambro por la venontoj.
- Ĉ estas ĉevalo tiom bela.
- Ĉ estas ĉashundo tamen fidela.
- Ĉ estas sukplena ĉerizo dolĉega.
- Ĉ estas somera ĉielo bluega.
- Ĉ ja estas ĉokolado, bongusta frandaĵo.
- Ĉ estas ĉemizo, tre homa vestaĵo.
- Ĉ estas ĉu, la demando eterna.
- Ĉ estas ĉu, sole ĉu: la fajro interna.

Rogiero.

Interparolo.

Maŭrino: Lenjo, ĉu vi iros al Parizo?

Lenjo: Jes, mi iros tien. Ĉu vi volus kuniri?

M.: Kompreneble. Kiu ne volus? Jam la preparoj estas agrablaj.

L.: Mi faros liston de ĉio, kion mi bezonos. La sapon mi metos en sapujon kaj por la dentbroso mi havas ujeton el plastikaĵo.

M.: Se mi iros, mi skribos sur mian liston: paron da mallongaj,

lanaj ŝtrumpetoj kaj ŝuojn taŭgajn por longa promenado.

L.: Certe ni multe promenos, ludos kaj dancos tie. Junular-Kunveno ne estas ripozejo. Mi volos partopreni en ĉio, kio estos sur la programo.

M.: Ĉu la reguloj estas severaj en tiaj kunvenoj? Mi estas liberecama.

L.: Sendube la ĉefaj reguloj devas esti severaj, ĉar nur tiam la kongreso povas esti agrabla kaj eduka. El ĥaoso ĉiam naskiĝas malpaco.

M.: Sed mi ŝatas dormi en la mateno.

L.: Do, restu hejme kaj dormu kiel talpo sub la tero.

M.: Ne koleriĝu! Mi ne restos en la lito, kiam ĉiuj eliros. Mi sekvos la grupan vivon.

L.: Bone! Kaj parolu Esperanton en la kongreso! Kiam naskiĝis la aŭtoro de Esperanto?

M.: Vi surprizas min. Ĉu mi devas scii tion por partopreni en la kongreso en Versailles ?

L.: Jes, ankaŭ tion vi devas scii. Do bone aŭskultu kaj ne forgesu: Lazaro Ludoviko Zamenhof naskiĝis je la 15-a de decembro en la jaro 1859-a en Bjelostoko en Polujo.

M.: Dankon. Vi pravas. Tiajn faktojn oni ne forgesu. Nur per la lingvo de d-ro Zamenhof povas okazi vere internaciaj kunvenoj. Ni ĉiam memoru lin.

L.: Kaj bone ni studu, por ke ni plene ĝuu la spiriton de la Internacia Junular-Kunveno en Versailles. Ĝis revido!

M.: Saluton, mia kara!

Ekzerco: Faru kvar frazojn ĉe ĉiun el la subaj bildoj:



1. ...
2. ...
3. ...
4. ...



1. ...
2. ...
3. ...
4. ...



1. ...
2. ...
3. ...
4. ...



1. ...
2. ...
3. ...
4. ...

Por Komencantoj.

Oficiro kaj forĝisto.

Oficiro estis tre forta. Iam li venis al forĝisto. Li petis hufferon por sia ĉevalo. La forĝisto montris feron al la oficiro. Sed la oficiro diris: „Ĝi ne taŭgas. Vidu nur!” Per malmulta peno li kurbigis la feron. La forĝisto diris nenion. Li prenis alian hufferon, kaj montris ĝin al la oficiro.

„Bone,” diris la kliento, kaj li donis arĝentan moneron al la forĝisto. Tiu rigardis ĝin kaj diris: „Sinjoro tiu monero estas el plumbo! Vidu nur.” Kaj tre facile li kurbigis ĝin.

La oficiro ridis kaj diris: „Vere, vi superas min! Jen estas ora monero por vi!”

Malĝentile.

Ĉe la haltejo de la tramo sinjoro diras al alia sinjoro:

„Ĉu vi atendas la tramon?”

„Hmmmmm,” diras la alia. „Kompreneble! Aŭ ĉu vi pensas, ke la tramo atendas min?”

Infanpenso.

La patro de Manjo plugas la teron en la ĝardeno. Manjo vidas, kiel li metas bovinajn ekskrementojn en la grundon.

„Paĉjo!”

„Kio estas, Manjo?”

„Nun mi scias, kial la floroj kreskas!”

„Nu, kial do?”

„Ĉar ili baldaŭ volas eliri el tiuj malbonodoraj malpuraĵoj!”

Klera!

„Ĉu vi povas pruntedoni al mi spegulon?”

„Ĉu vi deziras grandan, aŭ malgrandan?”

„Mi nur devas razi min.”

„Ho, tio ne eblas per niaj speguloj! Por tio vi bezonas razilon!”

Esperanto en mia vilaĝo (infana verkaĵo).

Mi estas esperantisto de post tri jaroj, kaj mi loĝas en la kamparo. Kiam mi lernis la internacian lingvon multaj homoj demandis al mi: „Kial vi lernas Esperanton? Ĉu vi povos uzi tion?”

Mi klarigas tion al ili. Ili bone komprenas, ke Esperanto estas utila inter la popoloj, sed ili ne komprenas, kiel mi povos uzi ĝin. Mi havas plurajn korespondantojn, sed ili ne komprenas, ke oni povas skribi al gejunuloj, kiujn oni neniam vidis, kaj neniam vidos. (Vere miaj gepatroj ne estas sufiĉe riĉaj por pagi vojaĝon al miaj korespondantoj). Tamen mi daŭrigas korespondi, ĉar mi ne volas fari kiel gekamaradoj kiuj lernis Esperanton samtempe kun mi: Ili preskaŭ ne memoras ĝin, ĉar ili ne daŭrigis korespondi. Tial nun estas nur tri esperantistoj en Magné, el tridek kiuj komencis lerni Esperanton.

Mi esperas, ke aliaj esperantistoj estas pli kuraĝaj ol tiuj en mia malgranda urbeto! Ĉar mi kredas, ke kamparanoj povas esti same bonaj esperantistoj kiel tiuj en urbego!

Roland Chaudron (11-j.), Jousson par Magné, Francujo.

Enigmo.

Cu vi povas meti 10 objektojn en 5 vicojn po 4?

(La solvon vi trovos en la venonta numero).

La solvo de la enigmo en la antaŭa numero: unu-okul-ul-ino.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Versailles 3-10 aŭg. '49.

Unue ni kun granda bedaŭro informas pri la morto de s-ro Chilard, kiu tiom sindone komencis la aranĝadon de nia TJO-kunveno en Versailles. En li la Esp. movado perdis fidelan amikon. Ke li ripozu en paco

Feliĉe lian taskon en la organizado de nia kunveno transprenis la aliaj komitatoj. Geamikoj: helpu ilin laŭpove! Se vi intencas iri al Versailles, anoncu vin kiom eble plej baldaŭ, por ke ili havu superrigardon pri la nombro da partoprenontoj. En la februara n-ro de LJV troviĝas aliĝilo, kiun vi bonvolu plenigi kaj sendi al S-ro Bizet, Wierre-au-Bois par Samer, P. d. C. NE PROKRASTU, oni petas en Francujo!

Pri la pago oni interrilatu ankaŭ kun Bizet. Nederlandanoj klopodu akiri francan monon ĉe la grandaj bankoj. Oni zorgu pri propra pasporto.

Multaj deziras resti en Versailles post la kunveno. Oni kiom eble plej klopodu mem serĉi loĝejojn ĉe gekorespondantoj, dum la dua semajno. Ankaŭ eblos loĝi en tendaro (prezo potage 300 fr), sed ne eblos resti en la lernejo post 10 aŭgusto.

Ni havos du varmajn tagmanĝojn ĉiutage: tagmeze kaj vespere. La kuiristoj petas, ke ĉiu kunportu: 250 gr. da sukero kaj 150 gr. da butero aŭ margarino kaj se eble laktpulvoron.

Nederlandanoj, kiuj deziras vojaĝi per grupa vojaĝbileto anoncu sin ĉe Theo v. Kempen, Wouwermanstr. 29 rd. Haarlem, antaŭ 1 majo. Sed atentu bone: nur tiuj povas vojaĝi per komuna bileto, kiuj komune iras tien kaj returnen.

Ĝis nun anoncis sin: El Anglujo: s-ro L. Symes (Minchinhampton); s-ro R. W. Hamilton kun ok knaboj (The Grammar School, Hemsworth); S-ro G. Tordoff (Brislington); f-ino C. Sawyer kun grupo da knabinoj (Mosely, Birmingham); F-ino N. Rees (Seven Sisters) venos kun 19 knabinoj: Marie kaj Gwenda Davies, Jean Burferd, Audrey Whittington, Eira Morgan, Margaret Jenkins, Maureen Mathews, Shirley David, Beryl Griffiths, Hilery Powell, Joan Gethin, Joyce Williams, Peggy Evans, Sheila Davies, Betty Alexander, Morwen Hughes, Enid Hughes, Rachel Evans, Doris Suffrith.

El Danujo: s-ro Peter Christensen (Middelfart) sciigis ke li kun 29 danoj venos per aŭtobuso. El Francujo: s-ro Perrin Marcelle (Valdoie); s-ro Lentaigne kun kelkaj junuloj (Balaruc les Bains). El Nederlando: Helmi Veldhuizen (Delft); f-ino M. Snijders (Purmerend); f-inoj A. kaj N. Kool (W. Graafddijk); s-ino v. Veenendaal (Limmen); Jopie kaj Hennie Bokhove kaj Hennie Stoffels (Hengelo); Annie Gans (Haarlem); s-ro Th. v. Kempen kun kvin aŭ ses knaboj (Haarlem). Diversaj anoj en Germanujo, Polujo kaj Ĉeĥoslovakujo klopodas akiri vojaĝpermeson, por ke ankaŭ ili povu partopreni.

Multaj ankoraŭ hezitas pro la altaj kostoj. Tiucele ni ripetas la ĝironumeron de Roger Bizet: „Lille 1821.35”. Surprizu lin per viaj donacoj, por ke li feliĉigu multajn junulojn!

Rilate la donacojn: diversaj personoj intencas donaci iom da mono, sed pro la moncirkulado nun ne povas sendi ĝin al la franca kasisto. Ni petas vin tamen informi la organizan komitaton pri viaj intencoj, por ke ĝi povu fari budĝeton, kaj scias kiom da junuloj ĝi finance povos helpi. Laŭ la raporto de la kasisto de la komitato ni poste raportos pri tio en LJV.

Ricevitaj donacoj: F-ino V. N. en Birmingham (Brit.): 20.— guld.; F-ino M. S. en Purmerend (Ned.): 5.— gld.; F-inoj K. en W. Graafddijk (Ned.): 10.— gld.

Tendumado en Nederlando 26/7-2/8 1949.

La Nederlanda Sekcio de TJO organizas semajnan kunvenon en Callants-oog por infanoj kaj junuloj. Partoprenkostoj (inkluzive la vojaĝkostojn): 20.— g. Oni mem kunportu litkovrilojn, manĝilaron kaj kalikon. Oni kiom eble plej baldaŭ anoncu sin ĉe A. Beinema, Schoterweg 136 rd., Haarlem. La nombro de partoprenontoj estas limigita. Kiel garantian sumon oni ĉe la anoncado pagu 5.— g.



TJO-RUBRIKO.

(sekr. A. Schouten, No. 122, Oosthuizen, Ned.).

Britujo: Dum Orientfederacia Kunveno en Ipswich oni montris la TJO-filmojn pri Groet ('38) kaj Ipswich ('47). La sukceso estis granda. Ĉeestis proksimume 100 personoj, inter kiuj ankaŭ la prezidantino de la Ipsviĉa Eduka Komitato. Parolanto ĉe la filmoj estis s-ro Heath, la organizinto de la

TJO-kunveno en Ipswich.

La Libro-servon de T.J.O. provizore prizorgos f-ino A. Kaagsman, Voorhaven 80, Edam, Nederlando. Oni bonvolu bone noti la adreson kaj direkti tien siajn mendojn.



Ĉi tiu sportulo estas nia ĉefperanto en Aŭstralio: s-ro Fr. Halls Bongong. — Ni proponas laŭvice meti en LJV fotojn de ĉiuj ĉefperantoj de TJO, por ke la TJO-anaro, almenaŭ per fotobildoj, konu la landajn gvidantojn. Tiucele ni petas al ĉiu ĉefperanto sendi klaran foton de si al TJO-Centro.

La venonta numero de LJV aperos komence de junio. Manuskriptoj estu en la redakstejo antaŭ 15 majo.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Bulgarujo: Peter A. Petrov, str. „92-94” No. 77, Peŝtera, dez. kor. per bildk.; interŝ poŝtmarkojn kaj gazetojn kun la tuta mondo.

40 kursanoj, lernantoj 16-18 jaraĵ, dez. kor. kun alilandaj gelernantoj. Resp. certa. Stojĉo Kostov, str. „Car Samuĵl 85, Burgas.

Ĉeĥoslovakujo: 16 gelernantoj (18-26-j.) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al: S-ro Petr. Tichota, Varsavská 5, Karlovy Vary.

Esp. Rondo de SEL en Ĉeská Lipa aranĝos leter- kaj skoltvesperon je 27/IV'49. Ankaŭ kor. Adr.: Jirí Sobotka, Ĉeská Lipa 197.

Vlad. Novotny, 21-j. studento, Mánesova 1252, Č. Budejovice, dez. kor. per belaj il. poŝtkartoj kun la tuta mondo. Resp. certa.

Ludvík Zaoral, U potoka 21, Hólice u Olomouce, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

La Esp. klubo en Cheb, poŝtkesto 2, F. Patera, aranĝos la 17-an de majo lertervesperon por siaj kursanoj: 20 gejunuloj kaj 22 lernejoj infanoj 13-14-j. Skribu multnombre, kaj bonvolu sendi propagandmaterialon.

Germanujo: 20-jara studento dez. kor. kun ĉiulandaj gejunuloj; kol. il. poŝtk. Rudolf Hilt, Mühlheim bei Koblenz, Sihulstrasse 6.

Hermann Volk (20-j.), 22b Mühlheim/Koblenz, Rübenacher str. 2, dez. kor.

Hispanujo: 18-j. lernanto dez. kor.: J. Figueras, Stra Barca 1-7^o, Gerona. K-do M. Tarrago, str. Pl. Mayor 5, Almatret (Lérida) dez. kor. kĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, interŝ. revuojn, il. poŝtk., ktp.

K-do Amadeo Lladser, str. Congost 13, 1^a-1^a, Barcelona (G.), dez. kor. kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj.

K-do R. Sorolla, str. Torrente vidalet, 13, 1^o, Barcelona (G.), dez. interŝ. pm. k.ĉ.l. resp. certa, se estas rek. let. kaj fermita per sigelvakso.

Japanujo: 25-j. maŝinĝenero dez. interŝ. poŝtmarkojn kun nederlandano. S-ro Kazumi Hurukawa, Hukiage Nakabasisuzi-7, Wakayama-si.

25-j. elŝipigisto (fraŭlo) dez. kor.k.gejunuloj, interŝ. pm. Torajuki CuCida, 33/II, Midori-ĉo, Otaru, Hokkaido.

20-j. japano dez. kor.k. nederlandano, 267 Shiizu, Aneseki-machi, Chiba-ken.

Polujo: B. Palczynski en Reda k. Gdyni (ĉefperanto de Polujo) petas pardonon, ĉar li ne povas respondi al ĉiuj korespondantoj. Por kor. adr. oni turnu sin al Asocio de Esp. en Gdynia, Svistojanska 59/1.

MONDA TRIBUNO, Internacia gazeto por kulturo, literaturo, scienco kaj tekniko. Aperas monate, grandformata. Abonkotizo **4 guld.** jare. Oni povas aboni pere de TJO-Centro en W. Graafthijk, Ned. Petu senpagan specimenon ĉe: „Monda TRIBUNO”, Wien IX, Rossauerlande 27, Aŭstrujo.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO”

aĉeteblaj de la jaroj:
'34/'35, '35/'36 kaj '36/'37. Perfekta materialo por komenc- kaj daŭrigkursoj.
Prezo po 1.— guld.

Mendu ĉe la TJO-Libroservo, Voorhaven 80, Edam, Nederlando.

KURSGVIDANTOJ! Bonegan materialon vi trovas en la de J. Muuses, Purmerend, eldonitaj lernolibroj:

Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo” **0,50 gld.**

Apartenanta vortlisto (speciale por nederlandanoj) **0,15 guld.**

„Sub la Verda Standardo” (plena metodo, konsistanta el: **Gvidilo** (nur por la gvidanto) ... **2,50 gld.**

„Laboriloj” I kaj II, po **0,90 „**

„Memorigilo” „ **0,50 „**

Mendu ĉe la TJO-Libroservo, Voorhaven 80, Edam, Nederlando.

Se vi serĉas germanan korespondanton, mendu 2-linian anoncon en „La Ponto”. Koŝto 5 resp. kup. (13b) München-Pasing, Engelberstr. 7.